



*Estrara Komunikado EKO 2017-15 sendita el Budapeŝto, la 5an de junio.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkröĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

## Praktike kaj inspirige

La partoprenantoj en AMO-LIMA (la 35a seminario en la serio) havis okazon ne nur diskuti edukajn temojn, kiel raportite en EKO 2017-14, sed ankaŭ sperti duontagan viziton al lernejo, kie Esperanto formas integran parton de la lernprogramo.

La lernejo troviĝas en La Chaux-de-Fonds, urbo kun granda movada historio. Ĝi estas eta privata lernejo, kun nur 24 lernantoj, inter la aĝoj de 6 kaj 16 jaroj. Ĝia pedagogio sekvas la ideojn de la franca pedagogo Célestin Freinet. (vidu ĉe: [https://eo.wikipedia.org/wiki/C%C3%A9lestin\\_Freinet](https://eo.wikipedia.org/wiki/C%C3%A9lestin_Freinet))

Komence de la vizito, la seminarianoj povis trairi la lernejon kaj admiri ekspoziciojn kaj vidi resumajn murafiŝojn pri la studitaj temoj. La studtago ne dividiĝas en tradiciajn studtemojn, sed kunigas ilin por esplori kaj studi diversajn elektitajn temojn. Anstataŭ la direktoro, estas la lernantoj, la instruistoj kaj la gepatroj – la trojko, kiu gvidas la decidadon kaj organizadon de la lerneja vivo. Ĉi tie Esperanto estas tute normala studobjekto, ne nur ĉar ankaŭ Freinet siatempe jam uzis ĝin, sed ankaŭ pro personaj konvinkiĝoj.



Fotoj: SMG

Sekvis klarigoj pri la lernejo, donita de la seminaria gvidanto Mónica Molnár, kiu estas instruistino en tiu lernejo 'La Granda Ursino'. La programo en la lernejo venis al la fino, kiam en du grupoj la seminarianoj kune ludis kun la deko da lernantoj, kiuj konsentis kaj povis reveni en la feritaga vendredo de longa semajnfino. Unu grupo kartludis, la alia demandludis. Tiel, la seminarianoj povis mem sperti la parol-kapablon kaj -lerton de la lernantoj. Des pli mirige, ni fine de la vizito en la agrabla lerneja ĝardeno, kun urbe aprobata arbodomo, kiun la lernantoj kaj instruistoj kune konstruis, eksciis, ke kelkaj el tiuj lernantoj eklernis la lingvon antaŭ nur ok monatoj. La tuta vizito konvinkis nin pri la lernemo de la lernantoj, unuflanke por Esperanto, aliflanke por ĉiu parto de la studplano. Seminarianoj spertis modelon, vere sekvindan en aliaj mondpartoj.



Supre  
maldekstre:  
Ludrezulto  
anoncita  
aplaŭdrikolte.

Maldekstre:  
Lernantoj  
ĝardene ricevas  
memor-  
bakaĵojn.



## Pli da AMO

**AMO 36** okazos en Teruelo, Hispanio en la 26a kaj 27a de junio, kadre de la nacia kongreso. Ni alkrôças la programon detiu seminario, kies temaro ligiĝas al la Zamenhof-jaro.

**AMO 37** okazos en Raleigh (NC) en Usono kadre de NASK, kiu okazos inter la 4a kaj la 13a de julio.

**AMO 38** okazos en la 50a Kongreso de ILEI en Busano, Koreio, kun eduka temo.

Pri la AMO-seminario en Novjorko fine de aŭgusto ni jam raportis en EKO 2017-12.

Vortoj: 405 vortoj

Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <<https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>>.

Aperintaj komunikiloj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikiloj-pri-agado>

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.